

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Adiaŭ, somero!

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

2005

Kiel Roman Dobrzynski, elstara ĵurnalistoj kaj E-verkisto iĝis esperantisto
verkoj de niaj legantoj — gramatiko serioze kaj amuze — aforismoj
anekdotoj — ripozejo — la praktiko — korespondu!

4

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo. Casilla de Correo 2910 - Correo Central. AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA. Esperanto-domo. 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140. BE-2000. Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo. Caixa Postal 03625. Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1. CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo. PO Kesto 825. CN-100037. Beijing

~ S-ro Cui Jiayou. P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits. Villimaa 17 -- 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kcsala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Scoger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14. 6D. ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio. Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravclo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, I.T-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo. Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio. rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarhyckevagen 29, SE --- 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schlegeldorn 6, CH --- 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Mi esperas, ke vi havis belan someron, bonferiis, ĝuis naturon, dum sunaj tagoj kolektis bezonatan por la tuta jaro energion, sukcesis spiri freŝan inspirigan aeron. Espereble ke nun vi pretas plonĝi en la maron de kreado, tenante kiel savrington nian "Komencanton"!

En ĝia vica numero vin atendas multe da interesa. En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" - intervjuo kun Roman Dobrzynski - elstara esperantisto, kiu jam dum 50 jaroj aktivas en la E-movado, sur diversaj ĝiaj laborkampoj: kiel redaktoro de multaj vaste konataj E-revuoj, kiel E-movadano, kiel E-verkisto. Pri R. Dobrzynski mi legis antaŭe, aŭdis pri li de aliaj, sed mia unua renkontiĝo kun li okazis dum 89 U/K en Pekino (kun granda intereso mi aŭskultis liajn elpaŝojn dum kelkaj kongresaj programeroj). Se post tiu renkontiĝo oni demandus min: "Kio ligita kun lia personeco impresis vin unuavice?" - mi senhezite respondus: "Lia modesteco." Sed kiom multflanka, interesege persono li estas, vi povas ekscii, traŝinginte lian "esperantistan biografieton".

Por la rubriko "Verkoj de niaj legantoj" ĉi foje kontribuas per sia nova originala verko jam bone konata al vi laŭ antaŭaj publikikaĵoj en "K" aŭtoro el Rusio Vladimir Opletajev. Laŭ mia opinio la aŭtoro havas sian propran beletran stilon, riĉan kaj esprimplenan lingvaĵon. Vladimir estas komencanto nur en sfero de verkado, sed ne estas komencanto en la lingvouzado, li libere regas la lingvon, tial lia verko eble ne estos facila legaĵo por iuj, sed se vi legos malrapide, eble eĉ preninte vortaron, vi povos ne nur ricevi plezuron de la bona stilo, sed tiu ĉi legado povas iĝi ankaŭ lerniga kaj utila por vi. Do, legu kaj opiniu ankaŭ vi!

Versamantoj povas ĝui poeziajn paĝojn, kie multas versaĵoj de diversaj aŭtoroj: Yves Brusq el Francio, Anneke Biys el Nederlando, Aleksandr Morev kaj Nikolaj Neĉajev el Rusio. Ilin unuigas la komuna temo - impresoj de ĉirkaŭanta naturo.

Por ne forgesi, ke ankaŭ Esperanto estas lingvo kaj ke malgraŭ simpla gramatiko oni devas ĝin ekzercadi kaj strebi plibonigi la lingvokonon, ni, kiel ĉiam, proponas al vi "Gramatikon serioze kaj ŝerce".

Espereble vin distros kaj bonhumorigos niaj humuraj paĝoj, kie vi trovos novan stokon da aforismoj, anekdotoj kaj interesan vegetaran krucenigmon, kiun sendis al "K" nia nova kontribuanto Aleksej Hohlov el Novosibirsk.

Agrablan legadon!

Rafija Kudrjavceva

KOMENCANTO

2005 numero 4 // (54) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio
retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005: internacia tarifo: 15 eŭroj
orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al: Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041, Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Kiel tio komenciĝis

Roman Dobrzynski

Tutmonde konata esperantisto, ĉi jare elektita kiel honora membro de UEA; elstara pola ĵurnalisto; 1960-63jj - prezidanto de Pola Esperanto-Junularo kaj redaktoro de ĝia organo "Tamen"; 1963-64jj - redaktoro de "Pola Esperantisto"; 1966 - vicprezidanto de TEJO kaj redaktoro de "Kontakto", 1986 - prezidanto de PEA; 1989j - vicprezidanto de UEA. Aŭtoro de vaste konata kaj tradukita al multaj naciaj lingvoj libro "La Zamenhof-strato".

50 jarojn sur la Zamenhofa vojo

Antaŭ 50 jaroj vi iĝis esperantisto. Mi gratulas! Kiel vi tostos tiel belan jubileon?

Per botelo da moldava vino de la jaro 1987, ĝi hazarde "transvivis" mian 50-an naskiĝdatrevenon, kiun mi festis dum tiu jaro.

1987 estis la centa jaro post la naskiĝo de Esperanto.

Ĝuste tiam okazis la granda jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Tamen atentu, mi naskiĝis en Varsovio en la jaro 1937, kiam Esperanto festis sian 50-jariĝon. Ankaŭ tiam la ĉefurbo de Pollando gastigis la jubilean UK-on. Ne miru, ke mi rimarkas la 50-jariĝon de mia esperantisteco kiel magian sinsekvon de ciferoj.

Se en la jaro 2005 Vi celebras 50-jaran jubileon de Via esperantisteco, tio signifas, ke Vi la unuan fojon rendezvis kun Esperanto en la jaro 1955. Kiel tio okazis?

En la malnovurba varsovia strato Kozia mi rimarkis surmure verdan sageton kun la surskribo "Esperanto". Ekinteresis min la belsona vorto kaj mi sekvis la sageton. Fine mi trafis en kelan ĉambron, kie sidis tri maljunuloj. Iom konfuzite mi demandis, kio estas "esperanto". Ili tuj, rivalante unu kontraŭ la alia, superŝutis min per entuziasmaj klarigoj, kiuj ŝajnis neniam finiĝi. Eble post unu horo mi sukcesis eskapi nur dank' al la arde ripetata promeso partopreni kurson de la lingvo internacia. Fakte mi ĵuris neniam plu eniri la „Kapran straton“.

Se ni nun interparolas Esperante, tio signifas, ke Vi tamen revenis tien.

Jes, septembre 1955 mi ricevis mesaĝon pri la inaŭguro de Esperanto-kurso. Kvankam ĝi daŭris nur tri monatojn, mi sukcesis paroli Esperanton ne malpli bone ol la francan aŭ rusan, kiujn mi lernis jam kelkajn jarojn.

Kiu instruis Vin tiel efike?

Tadeusz Michalski, poste la konata leksikografo. Li estis erudito, poligloto, tipa ov-kapulo, ĉiam tre serioza persono. Nur el lia nekrologo mi eksciis, ke li estis nur kvin jarojn pli aĝa ol mi. Unu jaron pli malfrue mi partoprenis propravole alian kurson gvidatan de la fama, hungara Esperanta poeto, Julio Baghy. Aŭtune 1956 li venis al Varsovio, sed ne povis reveni al Budapeŝto, ĉar tie eksplodis revolucio.

Ĉu li estis la unua eksterlandano, kun kiu Vi parolis Esperante?

Eĉ dufoje la unua, ĉar duonjaron pli malfrue mi vizitis lin en Budapeŝto, portante nigran panon, kiun li ŝategis, sed ne povis trovi en Hungario. Mi partoprenis tiam la unuan post la milito ekskurson de esperantistoj al eksterlando. Sinsekve en Budapeŝto, Bukureŝto, Beogrado kaj Sofio amase akceptis nin esperantistoj kaj ĉiuj luktis inter si por gastigi nin en siaj hejmoj. Mi memoras, kiam en Budapeŝto sur la kajo du samideanoj tiris miajn manojn en tute kontraŭajn direktojn.

Kiu venkis?

Sinjoro Jozefo Sary evidentiĝis pli forta. Hejme atendis nin vespermanĝo. La mastrino servis tipan hungaran pladon, nome "fiŝsupon". Oni ŝiris kurtenojn kaj komencis rakonti teruraĵojn pri la revolucio kaj la invado de sovetaj tankoj. Mi metis en la buŝon unuan kuleron da supo. Ĝi estis terure spica, do el miaj okuloj ŝprucis larmoj, kiuj tiel kortuŝis la hungarajn samideanojn, ke ili ĉirkaŭpremis min kaj ankaŭ ekploris.

Esperanto evidentiĝis praktike utila lingvo?

Dum la vojaĝo mi nature ekzercis ĝin. Sekve nia grupo vizitis Bukureŝton kaj Beogradon. Atinginte fine Sofion, mi jam flue parolis Esperanton. Dum la plua rond-



vojaĝo en Bulgario mi renkontis multajn gejunulojn parolantajn tre bone la Zamenhofan lingvon. Fakte dum tiu vojaĝo mi fariĝis vera esperantisto.

Kion signifas: vera esperantisto?

Interalie tion, ke mi komencis aktivi. Fine de la kvindekaj jaroj okazis tiel nomata politika "degeliĝo". En Pollando la reĝimo multe mildiĝis. La transvivintaj esperantistoj forlasis siajn katakumbojn, sed tute mankis gejunuloj. Ili aperadis tie kaj tie kaj iom post iom retrovis unu la alian. Ni fondis Polan Esperanto-Junularon, kiu ekagis per novaj metodoj, ni kuraĝe alfrontis junularajn organizaĵojn. Tiel naskiĝis la ideo de "NEOF" (kunlaboro kun ne-esperantistaj organizaĵoj), kiu akceptiĝis sekve en aliaj landoj.

Kun momenton de la tiama Esperanto-historio Vi konsideras lu plej grava?

Sendube la jaron 1959. Tiam Varsovio gastigis la Universalan Kongreson de Esperanto okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. Ĝi estis entute la unua UK en la komunista bloko. Nun mi ĝin vidas iom simila al tiu de Bulonjo-sur-Mar: ekparolis inter si ne la klasmalamikoj, sed homoj kun homoj.

Kaj kio okazis poste?

Poste rapidege pasis 50 jaroj.

Intrvjuo, donita de Roman Dobrzynski al "Komencanto".

Ĉi-jare Roman Dobrzynski celebras 50-jariĝon de sia esperantisteco. Okaze de tiu grava dato estis verkita la sekva esperantista biografio de R. Dobrzynski por la revuo "Pola Esperantisto". Ni esperas, ke la vivo de tiu interesa persono impresos ankaŭ vin.

Esperantista biografieto de Roman Dobrzynski

1937 (01.11) – naskiĝis en Varsovio (okaze de la 50-jariĝo de Esperanto kaj la jubilea U K.)

1939 - 45 – transvivis bombadon de Varsovio fare de la germana Luftwaffe en rifuĝejo (Kredytowa 5), 200 metrojn de la familio Zamenhof (Królewska 41); pasigis infanecon en la naskiĝvilaĝo de la patrino, (eksciis, ke homoj parolas pole, germane kaj ruse, pro tio ili intermilitas).

1951 – 54 – lernis, ĉampionis pri gimnastiko.

1955 – esperantistiĝis, fininte kurson gvidatan de Tadeusz Michalski, sekve (1956) partoprenis kurson de Julio Baghy, helpe de li tradukis en Esperanton la polan popolan kanton "Iris knabineto", kiu disvastiĝis tra Esperantujo kaj estas ĝis nun kantata; komencis korespondi kun fremdlandaj esperantistoj, iumomente kun 30 personoj.

1956 – 63 – studis en Varsovia Universitato, magistriĝis pri juro kaj sekve pri ĵurnalismo pere de la verko "Funkcioj de la Esperanta Gazetaro", kiun preparis dank' al helpo de aŭstraj esperantistoj, kiuj ebligis al li esplorado en la Esperanto-Muzeo en Vieno; ĝi estis verŝajne la unua universitata verko en Pollando; dum la studoj instruis Esperanton en diversaj lokoj; por la kursaj celoj verkis libreton "La Nigra Kokino", kiu kelkfoje reeldonata aperis sume en 30 mil ekzempleroj.

1958 – 62 – fondis kaj gvidis Esperantan kabaredon "La Verda Simio"; konvinkiĝis definitive, ke Esperanto estas vera lingvo, ĉar homoj ridegis dum spektakloj; la kabaredan teamon konsistigis studentoj de teatra kaj muzika altlernejoj, kelkaj el ili iĝis elstaraj artistoj.

1959 – partoprenis (ĉefe en ĝiĉetoj) la jubilean 44-an UK en Varsovio okaze de la centjara naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof; samjare ekagis en Pola Esperanto Junularo fondita de Marek Pietrzak; **1960** fariĝis ĝia estrarano respondita pri NEOj, t.e. kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj.

1960 – 63 – prezidanto de Pola Esperanto-Junularo; redaktis organon de PEJ "Tamen", kiu pledis por realismaj agadmetodoj. PEJ superis tiam per sia aktiveco la PEA-n, ĝian kongreson en Bytom (1962) partoprenis ĉ. 600 gejunuloj.

1961 – kiel prezidanto de PEJ partoprenis la 17-an Internacian Junularan Kongreson en Wakingham (Britio), konatiĝis tie kun la estontaj "gigantoj" de la movado (H.Tonkin, J.Wells, U. Lins, C. Minnaja, V. Sadler, E.Weide, la fratoj Mastermann k.a.); prilaboris kun Uwe Joachim Moritz kaj subskribis senprecedencan kontrakton pri kunlaboro inter

PEJ kaj Germana Esperanto-Junularo. La kontrakto antaŭis la ekligon de formalaj rilatoj inter Pollando kaj F.R. Germanio kaj la faman "Leteron de la episkoparo" (Ni pardonpetas kaj petas pardonon).

1963-64 – redaktis organon de PEA "Pola Esperantisto"; ŝanĝis ĝian enhavon kaj grafikan aspekton, certigis al ĝi regulan aperadon. (Eldona proceduro de unu numero daŭris tiam kvar monatojn.)

1964 – fininte siajn studojn pri ĵurnalismo kaj ne trovinte laboron, decidis helpi sin per Esperanto; dank' al hispanaj esperantistoj ricevis vizon por Hispanio, sukcesis rompi la duoblan "feran kurtenon" kaj per motorbiciklo rondvojaĝis Hispanion kiel la unua pola ĵurnalisto post la milito; publikigis multajn artikolojn kaj libron, kiu liveris al li famon kaj konstantan okupon en populara studenta semajnevuo "itd". **1965** – faris alian motorbiciklan vojaĝon tra la Okcidenta Germanio laŭ invito de Germana Esperanto-Junularo, la vojaĝo fruktis per multaj publikaĵoj.

1966 – elektiĝis vicprezidanto de TEJO, redaktis la revuon de TEJO "Kontakto".

1967 – edziĝis al esperantistino el Hamburgo, Erika Rauschert, kiu sekve translokiĝis al Varsovio; ilia hejma lingvo estis Esperanto, 1967 naskiĝis filo Feliks kaj 1969 filino Ewa.

1973 – 2003 – laboris ĉe la Pola Televido, (daŭrigas sian kunlaboron kun la TVP); okupiĝis ĉefe pri la iberoamerika mondo (Hisp., Port., Latinameriko); dum longa tempo estis tutlande populara ĵurnalisto; plurfoje utiligis sian popularecon por propagandi Esperanton; aplikadis la metodon de nereakta propagando, t.e. parolis ne pri Esperanto, sed montris funkciadon de Esperanto, kiel ekzemple en la filmo pri la esperantista edukejo en Brazilo "Bona Espero" (1984) aŭ en la filmo "La reveno al Finnlando" (1989); ofte "remburis" siajn filmojn per Esperantaj epizodoj; faris por la TVP plurajn studiajn programojn kaj du filmojn, kies ĉeftemo estis la lingvo internacia, nome "Esperanto" (1987), kiu okaze de la centjariĝo de Esperanto prezentis diversajn aspektojn de ĝia uzo en 12 landoj kaj "Muroj de miljaroj" – pri la Pekina UK (2004).

1977 – 80 – estrarano de PEA pri kulturo, organizis kune kun Ewa Siurawska deklamkonkursojn pri E-literaturo kaj festivalojn de esperantlingva arta aktivado (OPERA).

1986 – kiel konata televida ĵurnalisto, estis petita aliĝi al preparado de la jubilea Universala Kongreso.

1987 – Kunlabore kun prezidanto de UEA Humphrey Tonkin kaj ĝenerala direktoro de CO, Simo Milojević, ĝuante grandan apogon kaj helpon de la pola esperantistaro, li grave kontribuis al la okazigo de la plej granda Universala Kongreso en la ĝisnuna historio de Esperanto; aparte fruktodona rezultis lia peno interesigi pri la kongreso amaskomunikilojn, speciale la Polan Pres-Agentejon kaj la Polan Televidon, kies rezulto estis abunda propagando pri Esperanto.

1989 – estis elektita vicprezidanto de UEA dum la UK en Brighton, kie kontribuis al la senprecedenca aliĝo al UEA de Litova Esperanto-Asocio, dum Litovio estis ankoraŭ sovetia respubliko.

1987 – 2002 – inspiris la honoran protektanton de la jubilea UK Roman Malinowski lanĉi la ideon de “utila Zamenhof-monumento”, kio konkretiĝis kiel projekto konstrui en Bjalistoko Mondan Esperanto-Centron, kies celo estus evoluigi Esperanton kaj promocii la urbon; kontribuis al establo de la Zamenhof-Fondumo, la institucio respondeca pri realigo de la projekto, prilaboris organizan kaj programan fundamenton de la Fondumo kaj de la Monda Esperanto-Centro ĉefe kune kun Jarosław Parzyszek kaj Humphrey Tonkin, kiu fariĝis la unua prezidanto de la Zamenhof-Fondumo. Estis reprezentanto de UEA en la Fondumo dum 14 jaroj, plenumante diversajn funkciojn, plej longe kiel prezidanto. Kune kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof proponis al la Fondumo Zamenhof establi “Medalon de Toleremo”. La ideo naskiĝis dum la verkado de la libro “La Zamenhof-strato”. La unua ekzemplero de la medalo estis enmanigita de d-ro Zaleski-Zamenhof (honora patrono) kaj prof. Hanna Konopka (la tima prezidanto) al la papo Johano Paŭlo la II dum la eklezia diservo en Drohiczyn la 10-an de junio 1999. La ceremonio anatiis longa proceduro por akiri konsenton de la papo, R. Dobrzyński trovis la vojon solvi tiun problemon pere de funkciuloj de Vatikano.


1992 – 1995 – Esperantigis la televidan lingvan kurson de BBC “Mazi en Gondolando”. Tiun verkon, senprecedencan en la movado laŭforme kaj laŭteknike, li realigis pere de la pola firmao “Tommy Publishers” kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago, en kunlaboro kun internacia teamo, ĉefe kun Mila van der Horst Kolińska (Nederlando).

1995 – malgraŭ korinfarkto ne sukcesis famiĝi en la rubriko “Ni funebras” dank’ al tuja operacio de la koro.

1993 – 2003 – verkadis en la pola lingvo kaj en Esperanto libron “La Zamenhof-Strato” kiel interjuon kun d-ro L.C.Zaleski-Zamenhof. (La dokumenta valoro de la libro konsistas en tio, ke ĝi rivelacias multajn nekonatajn faktojn pri la familio Zamenhof kaj Esperanto ĉefe el la tempo de la II mondmilito). La libro evidentiĝis fenomeno de la Esperanta literaturo, 1000 ekzempleroj eldonitaj en Litovio (2003) vendiĝis dum unu jaro (la dua eldono aperis 2005) kaj tuj sekvis eldonoj en aliaj lingvoj: litova, kroata, japana kaj ĉeĥa. Dank al iniciato de la sekretario de EVA, Spomenka Štimec, la libro estas eldonota en la slovaka, slovena, hungara, latva kaj estona lingvoj. Krome ekzistas jam portugala, ukraina kaj rusa tradukoj.

1984 – 2005 – Esperantigadis siajn televidajn filmojn per propra mono, konsiderante ilin instrumento de aplikado de la lingvo parolata. Pro sia laboro sur la filma kampo kaj pro la libro “La Zamenhof-strato” R.D. ricevis premion de la Fondado “Grabowski”.

2005 – Dum la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno li estis elektita fare de la Komitato de UEA (laŭ propono de la ĉefa estraro de PEA) honora membro de Universala Esperanto-Asocio. Kiel honora gasto li partoprenis la 62-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Zakopane; ekde kelkaj jaroj li finance helpas unuopajn junajn esperantistojn partopreni Esperanto-kongresojn. Ĉi-jare Roman Dobrzyński celebras 50-jariĝon de sia esperantisteco.



Enkonduko

La titolo de tiu ĉi libro aperas ĝuste elpensita. Tamen, ĉar cento da Zamenhof-stratoj troviĝas en diversaj landoj sur nia planedo, ĉu temas pri iu ajn strato portanta tiun ĉi nomon, aŭ ĉu temas pri unusola strato inter ĉiuj elektita? Aŭ pri strato virtuala, vojo per kiu marŝu la homaro laŭ la Zamenhofa revo?

Fakte ekzistas unu strato tute aparta: la Zamenhof-strato en Varsovio. Strato ĉe kiu staris iam domo signita de la numero 9, domo kie dum pluraj jaroj doktoro Zamenhof loĝis kaj laboris; kie, en la kurackabineto de li fondita, praktikis, dum multaj jaroj post Lia forpaso, Lia filo Adam, kaj post Adam Lia bofilino Wanda. Kaj per stranga koincido (ĉu koincido?), ĉe la sama Zamenhof-strato, novkonstruita post la dumilita detruigo, mi, Lia nepo, kvindek jarojn pli malfrue ricevis funkcioĝejon, kvankam ne sub la numero naŭ, sed ok; mi loĝis tie dum pluraj jaroj kune kun mia edzino kaj niaj filinoj.

La varsovia Zamenhof-strato surprize rezistis la stratnomŝanĝojn, ŝanĝojn, kiujn faris la sinsekvaj tieaj dum- kaj post-militaj regantoj. Dum la filo de Zamenhof estis mortpafita, dum aliaj familianoj enkarcerigitaj, mi rememoras tramveturilojn kun granda ŝildo “ZAMENHOF”, trapasantajn samtempe la Zamenhof-straton ĝis la tiea tramfinstacio. Same, nuntempe, trapasas tiun straton aŭtobusoj kun ŝildo “ESPERANTO”, irantaj ĝis Esperanto-strato, kiu proksime situas.

Tamen, dum la sombraj jaroj 1942 kaj 1943, la varsovia Zamenhof-strato kondukis centmilojn da mortkondamnitaj hebreoj en la direkton de vagonaroj al la “finsolva” centro de Treblinka.

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

La knabo kaj la besto

La knabo kuris laŭ bordo de arbara rivero. Liaj piedoj dronis ĝis la maleolo en humida apudakva argila tavolo, kaj senhelpe svingante la brakojn li penis elmergi la piedojn el retenanta lin tenaca kaĉo por plu movi sin for de ĉi tiu timiga loko. For de la spuroj, kiujn li komence ne rimarkis.

Atinginte tagmeze la riveron pro la soifo kaj sattrinkinte gustan puran akvon, li intencis unue grimpi sur altan oblikvan bordon varmigitan de la arda somera suno, por kuŝiĝi tie en mola herbo kaj ripozi antaŭ rea vojo. Sed cedante al sia deziro plu ĝui la tepidan rapidfluan torenton, li eniris la riveron, ĝis la femuroj ne plu videblis en la profundo, kaj plenmane verŝis agrable malvarmetan akvon sur siajn longajn nigrajn harojn kaj fortajn sunbrunigitajn ŝultrojn.

Li estis ankoraŭ adoleskulo, sed li jam antaŭĝojis masklajn fortojn, kiuj elprofunde ekburĝonis kaj estis rimarkeble reliefigantaj per liaj muskoloj kaj svelta fortika staturo. Nur post tri vintroj venos lia vico por fariĝi plenrajta ĉasisto en festa ceremonio, kaj tiun rajton li devas garantii per ia eminenta ĉasaĵo: rapidkura cervo aŭ ruza kaj malica linko estus tre taŭgaj pruvajoj de liaj spertoj kaj ĉaskapabloj. Kapti fiŝojn aŭ ĉasi birdojn kaj malgrandajn arbarajn bestojn li, kiel ĉiuj liaj samaĝuloj en la vilaĝo, scipovis lerte kaj ofte spertis sukcesojn en siaj tuttagaj marŝoj malproksime de la vilaĝo. La arbarego estis lia hejmo, kie li sciis ĉiun padeton, kondukantan al malhela kaŝita densejo aŭ al subteraj kavoj enloĝataj de klopodemaj meloj, ĉiun berabundan kampeton, regalantan malsatulon per dolĉaj frandaĵoj.

Fascinite de la somera ĝuo, kun la perlataj akvogutoj sur la haŭto, la knabo direktis sin al la bordo kaj subite ekvidis sur la argila tapiŝo grandajn profundajn spurojn. Ili aspektis kiel rondaj enpremitaj kavoj sigelitaj de potenca piedo kun akraj ungegoj. La spuroj estis tute freŝaj, kvazaŭ iu ĵus peze paŝis al la rivero, kaj tiel grandaj, ke ilia postlasinto devus evidentiĝi neimageble giganta monstro, kiu kaŝiĝis ie apude, gvatis liajn movojn kaj minacis lin per sia nevidebla ĉeesto. La skua danĝero, kaŭzita de la spuroj, hororigis la knabon abrupte kaj katenis lian tutan korpon. Li haltis kaj staris nun senmove, kvazaŭ li estus perturbita, kaj nur la pensoj febre penis analizi la plagon, kiun li subite trafis.

La perfekta flarsento jam certe komunikis al la besto pri la ĉeesto de la knabo, kiu kredis, ke tiu besto nur konforme al siaj sovaĝaj ĉasinklinoj ne hastis vidigi sin kaj nun gvatas lin sidante en iuj apudbordaj arbustoj. Se la rivera bordo apartenas al ĝia teritorio, la monstro gardas ĝin kaj senkompate forigas ĉiun veninton: ne gravas, ĉu knabon aŭ alian rivalon. La knabo, rigida de la morta minaco, subigante abomenan timon, atente

okulesploris apudbordan salikejon sen rimarki iujn movojn atestontajn la atencan puŝon de la besto. Ĉu eble la besto estas sata – meze de la somero ili satiĝas kutime per beroj kaj insektoj – kaj ne deziras ataki la entrudulon? Ĉu ĝi forlasis la lokon aŭ embuskas antaŭ ol alfronti la nepetiton ĉe la bordo? La grandegulo, perspure konfirminta sian mastrecon ĉi tie, devis esti jam matura kaj plenaĝa besto, kia ofte ne kapablas pro maljuniĝo aŭ ia lezo entrepreni preventan ofensivon. Almenaŭ por momemto tiu ĉi promesplena supozo vekis espereton ĉe la knabo pri feliĉa fino, sed la milda venteteo daŭre blovis trankvile de la rivero direkte al la bordo, kaj sekve la besto perceptante apenaŭ senteblan ŝvitodoron de la knaba korpo jam identigis fremdulon sur sia tereno kaj nepre atakos lin.

Kion fari? Tenante en la mano nur lignan lanceton la knabo apenaŭ povus rezisti al la terura kruda forto de la besto. Eĉ la plej sperta kaj lerta ĉasisto de la vilaĝo ne kuraĝus sola interveni antaŭ la arbara giganto. Al la knabo restis nur unu taŭga ebleco por sin savi - tuj fuĝi de ĉi tie.

Sed la rivera argilo perfide embarasis liajn movojn kaj li nur pene povis tiri la piedojn el ĝia glueca maso. Por eskapi la danĝeran kaptejon li devis kiel eble pli rapide kuratingi la sekvan sinuon de la rivero, kie komenciĝis malprofunda vadejo kun firma sabla grundo ebliganta al li akcelon de la iro. Nevole kuraĝiginte sin per neatendite laŭta ŝriko la knabo ekkuris preter la densa ombra salikejo timiganta lin per sia morna aspekto, sed feliĉe la salikaj branĉoj restis senmovaj kaj ne kaŭzis aperon de sovaĝulo. "Hej ho!" – Jam aŭdace vokis li aŭskultante plurfojan reeĥon de sia laŭta voĉo tra la rivera sino kaj kuris plu sen rigardi returnen.



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Lia korpo, trejnita pro ĉiutagaj esplormarŝoj tra kampoj kaj arbaroj kaj al kutimiĝinta al racia disipo de fortoj en plej streĉaj momentoj, ankaŭ ĉi foje servis lin senrifuze, nur la imago pri neevitebla kolizio kun la besto peze premis lin, kaj tiu netolerebla premo samtempe instigis lin al akcelita kurado kaj damaĝis lian bravan sintenon kondukante lin tutan iom post iom al elĉerpiĝo. La knabo apogis sin per la lanco en tiuj lokoj, kie la argilo ensuĉis liajn kruojn preskaŭ ĝis la genuoj. Katenite ambaŭkrure li estiĝis facile atingebla predo al ĉiu besta sangavidulo. Sed li ne volis esti buĉata kiel sencerba bruto sen kontraŭreagi, kaj ĉe kurtaj ripozhaltoj li atente rigardis sur la apudbordan altaĵon borderitan per dense kreskantaj verdaj herboj en kiuj lia persekutanto povus oportune embuski kaj insidi kontraŭ li.

Feliĉe, la mildaj ventoblovoj susuretis senalarme inter la florantaj herboj kaj sugestis kvietan pacon de la serena tago. Tio trankviligis la knabon. Restis ankoraŭ ne tre longa kurenda distanco ĝis tiu loko ĉe la rivero, kie la juna vaganto povus sekure halti por kvietigi sian anhelan spiradon kaj sendanĝere daŭrigi la vojon al la vilaĝo. Post persistaj baraktoj li finfine atingis altan kaj krutan bordon, de kie komenciĝis mallarĝa sabla strio kondukanta al bone konata surkampa pado. Metinte flanken sian lancon, li senforte falis sur la sablon kaj, ferminte la okulojn, mergiĝis en duonsvenan refortigan ripozon. Lian kapon okupis nek pensoj, nek travivitaj emocioj, li sentis nur pacigan malplenon en si mem. Eĉ la ekstera mondo ne kapablis tra la ŝvita vualo penetri en lin per blindigaj sunradioj kaj gajaj birdopepoj. Ĉio restis – inkluzive de antaŭtimoj pri malico de la besto tiel forte spronintaj lin – ekster la kadro de liaj perceptoj...

Neatendite liaj oreloj ekaŭdis pli laŭtan ol kaŭzitan de la venteto susuron de la herboj supre ĉe la bordorando, kaj la nova minaco fulmrapide vibrigis lian korpon ĝis ĝia salta leviĝo. Tuj kaptis li per la dekstra mano sian lancon kaj, streĉinte la membrojn, fikse rigardis sur la bordopinton. Desupre gapis al li kvazaŭ vizio el inkube hipnota sonĝo granda besta kapo.

Ho, - terurigiĝis la knabo. - Kia granda estas ĝi. Neirnagebla monstro!

La kapo, vidiganta sian abomene bavantan muzelon kaj timige flavajn dentegojn, per siaj nigraj okuloj fikse gvertis la knabon starantan ĉe la malsupra parto de la bordo. La besto estis jam tre maljuna kaj, konfuzita de la malebleco tuj kapti la persekutiton, ĝi apenaŭ riskis nun fari kapturman salton subborden por puŝi la malgrandan ĉasiston. La vila kapego mute balancis sin plu sen eligi iajn sonojn, kaj nur la nigraj okuloj elprofunde



ekzamenis daŭre la knabon starantan en saltopreta defendpozicio lancopinte incitante la beston.


La senmova kaj muta kontraŭstaro iom post iom eklaĉigis ambaŭ rivalojn. Ili ne povis senĉese stari alfronte kaj okullukti sen entrepreni iujn definitivajn agojn. La knabo, kiun la besto kaŝe sekvis laŭlonge de la rivero kaj kiu persiste batalis por sia vivo, ne plu estis atingebla por ĝia sufokprema ĉirkaŭpremo, kaj ĝi komprenis tion klare. La unuan fojon en sia longa vivo la besto devis rezigni pri la dorlotita ĉasaĵo, obstine ne cedanta al rutinaj ĉasreguloj favoraj al pli fortaj kaj lertaj. Sekve, ankaŭ tiu eta kurema mizerulo kun ridinda bastoneto en la pugno estis ne malpli lerta kaj aŭdaca ol la besto mem! La monstro apenaŭ konceptis senperajn konsekvencojn de siaj rezonoj, kaj, venkita de la senfruktaj klopodoj, ĝi lace fermis la okulojn kaj forturnis la kapon.

— Ho – ho! – Jubile vokis la knabo svingante sian lancon kaj ĝoje kapriolante sur la sablo. Mi venkis! Mi venkis la monstron, la teruran! - Hej ci, - li kuraĝe alparolis la kapon. – Mi ne timas vin. Mi ne timas viajn nigrajn okulojn kaj la akrajn dentegojn, ĉar mi estas homo, kaj la homo persistas en sia volo. Iru kaj vivu, ĝis viaj dentegoj dekoros baldaŭ kolĉenon de eminenta ĉasisto! - Kun obtuza muĝo la besto retiriĝis en la herbejon malantaŭ la bordo, kvazaŭ ĝi komprenus absurdecon de lukto kontraŭ la homa estaĵo, kaj direktis sin al la ombrodona arbaro. Nur la grandega bruna monto de ĝia foriĝanta dorso estis ankoraŭ longe videbla inter la herboj.

Por la besto tio ne estis hontinda kapitulaco, ĉar kiel besto ĝi ne sciis ja tiajn skrupulojn, sed kiel denaska ĉasisto ĝi cedis nur al egale nekonkerebla kontraŭulo. La knabo ekzamenis siajn fortojn kaj volon kaj lernis malsubiĝi al timo por esti fiera homo en tre komplikaj kombinoj de la vivo.

Yves Brusq [Douadrenes, Francio]


Pura somernokto.
Kantas la grilo.
Aŭ eble estas feino
ŝirmita de la roso
sub fungo?



la bildon sendis Osioka Moritaka [Hiroshima, Japanio]

Aŭgust-mateno

Du paseroj kverelas
Pri krustopeco.
Sur la ĉiel-lazuro
Pasas hirund-flugado.
Tra vaporo, oni divenas
La Kurban Monton
Barantan la nordon
Kaj velojn
Sur la spegulo de la buo,
Per mevoj kronita.



bildoj de Sulepov Aleksandr [Verhoturje, Rusio]

Morev Aleksandr [Puŝkin, Rusio]

...Baldaŭ – ja aŭtun...

Trankvile la rivero fluas,
Ondetoj plaŭdas ĉe la bord`.
En la ĉielo nuboj kuras
Kaj kantas la gitara kord`

Pri kio kantas? Pri la amo,
Pri larmoj, tristo, kapdolor`.
Nu, pri kutima homa dramo
Ne estas amo sen angor`.

Kaj nuboj kuras, akvo fluas.
Nenio novas sub la Lun`!
Mi sidas, fumas, simple ĝuas
Atendas, baldaŭ - ja aŭtun`.



Anneke Buys [Apeldoorn Nederlando]

Miksita

maldekstren blanka
dekstren nigra
cirkulas kriaĉante
kaj grakante
mevoj kaj korvoj;
aera kolizio de
mara kaj tera vivo.

Vojo al lernejo

La greso apud la vojo
ankoraŭ ŝajnis esti tiel alta,
la vojeto serpentumada
fasonita infanpiede
inter la vojo kaj fosaĵo
estis sufiĉe larĝa por
ĉiu esplora ekskurso;
flutherbo estis arbaro mistera
kaj aŭtune limakoj brunaj
skribis sian ĉifron
sur gresojn kaj ŝtonojn.

Neĉajev Nikolaj [Irkutsk, Rusio]

Mi jam revenos

Maje revenos poeto al maro,
Kiam forlasos la sonĝon burĝon',
Kiam aperos en floroj nektaro,
Kiam aperos pri amo bezon'.

Venos poeto somere al maro,
Kiam matenos en tajgo rozber',
Kiam eksonos tendare gitaro,
Kiam bronzigos la korpon veter'.

Venos poeto aŭtune al maro,
Kiam maturos en tajg' vakcini',
Kiam ekbuntos irize arbaro,
Kiam ekdancos aere foli'.

Iam revenos poeto al maro,
Ĉiam atendas poeton Bajkal'.
Mankas en mondo por veno la baro,
Veno al maro ja estas festeno.

Neĉajev Nikolaj [Irkutsk, Rusio]

Silentu la koro*Romanco pri Bajkalo.*

Kaj min ekbrakumas lirika kortrem'.
Silentu la koro! Ne kreu vi mem.
Nur ĝojaj koloroj
Kaj mola penik'
Rakontu pri floroj
Kaj verda larik'
Kaj min ekbrakumas lirika kortrem'.
Silentu la koro! Ne kreu vi mem.
Rakontu nur fluto
Kaj harpo kun ĝi
Pri ĝoja minuto
Kaj marsimfoni'
Kaj min ekbrakumas lirika kortrem'.
Silentu la koro! Ne kreu vi mem.
Silentu la koro! Ne kreu vi mem...



Sadretdinova Naila [Voroneĵ, Rusio]

Karaj legantoj!

Ĉi tie ni daŭrigas serion de materialoj pri ĝenerala lingvouzado kaj bona stilo, verkitaĵ de fama E-verkisto William Auld.

El "Kulturo kaj internacia lingvo", eldono de "Fonto".

La rolo de estetiko en la lingvouzado

Kiam temas pri lingvokono oni povas distingi diversajn gradojn de posedo. Por miaj nunaj celoj sufiĉas distingi tri: la ĉiutagan, la klarigan, la artan.

Ĉiutaga lingvaĵo estas tiu, kiun oni uzas por ordinara babilado; kutime ĝi estas supraĵa kaj senkolora, uzanta vortprovizon relative malgrandan, en kiu ripetigas senfantazie ĉiam la samaj paroltumoj. Ĝi uzas abunde kliŝojn; novaj esprimoj rapide kliŝiĝas pro trouzado. Lau sia karaktero ĝi estas relative malpreciza, sed la komunumo sukcesas subkompreni multon ne rekte esprimitan.

Klariga lingvaĵo estas tiu, kiun uzas ekzemple sciencistoj kaj instruistoj por komprenigi kiel eble plej klare kaj nemiskompreneble iun teorion aŭ faktaron. Ĝi ofte postulas specialan vortprovizon (= jargonon) aparte lernendan, por ke la grado de konkreta ekzakteco aŭ provizeco en la esprimado de konceptoj estu kiel eble plej alta. Kutime tiu lingvaĵo do estas ekzakta, gramatika kaj senkolora.

Arta lingvaĵo estas tiu, kiu esploras kaj ekspluatatas la latentajn esprimivojn de la koncema lingvo. Ĝin uzas ekzemple verkistoj, poetoj kaj advokatoj. Ĝi celas esti plejeble subtila, kolorplena kaj freŝa; kliŝon ĝi klopodas eviti (kvankam ne malofte ĝiaj plej trafaj eltrovaĵoj eniras la ĉiutagan lingvaĵon kaj kliŝiĝas). Ĝi estas aluda kaj implica. En ĝi abundas metaforoj. Beleco kaj eleganteco aparte karakterizas ĝin. Elstara ekzemplo de arta lingvaĵo en ĉiutageca kunteksto estas la "Proverbaro Esperanta" de Zamenhof.

Lingvoposedo varias de persono al persono. Plej dotitaj estas tiuj, kiuj scias trafe uzi ĉiujn tri jam priskribitajn gradojn aŭ kategoriojn.

Necesas emfazi, ke tio tute ne estas afero klasa; ekzistas profesoroj, kiuj sin esprimas plumpe, banale aŭ malprecize, kaj ekzistas simplaj laboristoj kiuj spicas sian ĉiutagan lingvaĵon sprite, kolorplene, eble eĉ poezie. Lingvouzado estas talento, kiel la aprecado de ekzemple muziko estas talento, kiun posedas la homoj

tre diversgame.

Sed kiel ĉiuj talentoj ĝi estas edukebla. Miaj nunaj komentoj pritraktas antaŭ ĉio la lingvaĵon artan; sed ĝiaj principoj estas aplikeblaj je ĉiu ŝtupo de la lingvouzado. Ĉu ne estas dezirinde, ke eĉ en nia ĉiutaga Esperanto ni esprimu niajn pensojn ne nur klare kaj trafe sed ankaŭ, se eble, elegante?

En ĉiu momento ni havas vastan elekton inter disponeblaj rimedoj lingvaj. La plej simplan frazon ni povas formi aŭ bele aŭ malbele. Kvankam pli gravas la enhavo de la penso, tamen se oni komunikas tiun enhavon freŝe kaj elegante, tio plifortigas la impreson ricevatan de aŭskultanto aŭ leganto.

Tio klare estas demando estetika.

Subtileco de la vortordo

Homoj posedantaj lingvon kun relative rigida vortordo ne ĉiam komprenas la avantaĵojn de vortordo relative libera. Efektive ili ne malofte supozas la ekziston de la natura vortordo (kiu spegulas, kompreneble, la vortordon kutiman en ilia propra etna lingvo), sed kiel eksplikis Wells, tio estas iluzio. Iu lingvo havas vortordon kutiman; sed ebleco variigi tiun kutimajn liveras valoran rimedon de subtileco kaj eleganteco (kiel ekzemple en la klasikaj lingvoj latina kaj greka). Ju pli libera estas la vortordo, des pli da rimedoj ekzistas; kaj vere Esperanto havas grandan liberecon tiurilate. Tio devenas parte de ĝia noveco – ĝi ankoraŭ ne havis tempon sufiĉan por ŝtoniĝi – kaj parte de la tutmondeco de ĝiaj uzantoj, kiuj kutimiĝis al la diversaj vortordoj de siaj etnaj lingvoj.



Tiu libereco de Esperanto evidente ne estas tuta. Kiel montris Piron; se oni diras la frazon: *por ke homo la juna homojn la maljunajn respektu, necesas ke komprenu li ilin*, tio restas Esperanto, sed "vekas senton de strangeco". Prave.

Tiu vortordo estas nekutima kaj samtempe pravigas sin nek signife nek estetike. La frazo fariĝis ne klara, kaj sekve nebona.

Sed vortordo kapablas multon komuniki. Se ni komparas du variantojn de simpla frazo, ni povas tion esplori: *Morgaŭ mia helpanto faros tiun taskon. Morgaŭ helpanto mia faros tiun taskon.*

En la unua, "mia helpanto" implicas, ke nur unu helpanton mi havas; en la dua, "helpanto mia" implicas la ekziston de pli ol unu helpanto, kaj preskaŭ egalas al "unu el miaj helpantoj". Se mi skribas: *Morgaŭ mia helpanto faros taskon tiun*, tio implicas "kaj ne taskon alian anstataŭe".

Sed ankaŭ tie ne finiĝas la eblecoj. Se ni prenas la kvar elementojn, kiuj konsistigas tiun propozicion; subjekto (mia helpanto), predikato (faros), objekto (tiun taskon), kaj adjekto (morgaŭ), ni konstatas, ke la parolanto (aŭ skribonto) disponas pri 24 diversaj manieroj aranĝi ilin!

... Kunteksto ofte gvidas la elekton. Ekzemple: *Jam delonge riparendas la alia maŝino. Tiun taskon mia helpanto faros morgaŭ.* La antaŭecon de *Tiun taskon* trudas la ĵusa mencio pri la farotaĵo, kaj la graveco de la tempo de riparo (morgaŭ) sugestas gin sur tiun gravan lastan lokon. Ĝeneralregule, la komenciĝo kaj finiĝo de bona frazo aŭ frazero estas lokoj ŝlosilaj.



Sylla Chaves [Rio de Janeiro, Brazilo]

Dairigo. Komenco en "K"-3

La papago ne parolas:
nur ripetas, sen kompreno.
Sed la homoj nun kontrolas
komunikon de delfeno.

*

El flugbirdoj la plej grandaj
estas certe la kondoroj.
Ljamo, en altaĵoj Andaj,
vidas ilin en la foroj.

*

Meleagro kaj ansero,
koko kaj anas', kun ravo,
eksilentas je l' apero
de la multkolora pavo.

*

Estas belaj la koloroj
de ara' kaj papilio,
kolibretoj apud floroj,
kaj la voĉ' de kanario.

Ĉiam zorgu pri abelo
kun atento kaj trankvilo.
Ju pli dolĉa la mielo,
des pli vunda la pikilo.

*

El trueto, kun kuraĝo,
mus' aperas, sub la luno.
Kuras rekte al fromaĝo,
kaj la kat' al ĝi, por puno.

*

Kun rapido kaj kun fido
gaje saltas bestoj du:
estas ja kanguruo
en la poŝ' de l' kanguru'.

*

Ĉio sekvas saĝan planon...
Ĵetu for senkaŭzan timon!
Cikoni' portas infanon
kaj anĝel' portas animon!

AF 😊 R I S M 😞 J

Kolektis kaj esperantigis **Dimitrova Tatjana** [Kamišin, Rusio]

— Ŝerco similas pasvorton — laŭ reago oni rekonas la parencajn animojn.

*

— Necesas aŭdace travivi tion, kion vi ne povas ŝanĝi.

*

— La vivo estas maratono, en kiu malgajnas tiu, kiu la unua venas al la fino.

*

— Kiam la deziroj koincidas kun eblecoj, malaperas deziroj.

*

— Bonkoreco estas bona trajto, des pli se ĝi apartenas al iu alia.

*

— Bona rakonto devas esti kurta. La malbona – eĉ pli kurta.

*

— La okuloj de amanto similas al pligrandiga lenso, sed okuloj de edzo eblas kompari ankaŭ kun la lenso, sed nur malpligrandiga.

*

— En 50 jaroj ĉiu el ni havas tian vizaĝon, kian meritias.

*

— Viro devas havi sur la ŝultroj kapon, kaj la virino – vizaĝon.

*

— Por esti bela ne sufiĉas esti nur bela.



sendis **Josef Fischer**, [Nordwalde, Germanio]

Esperantigis
Rimma Roganova
[Ĉusovoj, Rusio]

*Kelkaj konsiloj por dezi-
rantoj altiri atenton al sia
persono*

Kiel aspekti ekstravaganca

Kiam vi skribas ion ne uzu majusklojn kaj komojn.

☺ ☹ ☺

Invitu viajn kolegojn salti kun vi sur seĝoj ĉirkaŭ la tablo

☺ ☹ ☺

Telefonu al la servo de pretaj varmaj tagmanĝoj kaj diru, ke ĉe vi necesas forpreni malpuran manĝilaron

☺ ☹ ☺

Vizitu iun poetikan kunsidon kaj interalie interesiĝu, kial en la versaĵoj mankas rimoj.

☺ ☹ ☺

Faru ĉirkaŭ via labor-tablo kontraŭkulan reton kaj aŭskultu tropikan mizikon.

☺ ☹ ☺

Prezente monon el bankomato ĝoje krii "Hura! Mi denove gajnis en loterio!".

☺ ☹ ☺

Elirinte el zooparko krii "Alarmo! Tigroj forkuris!".

☺ ☹ ☺

Salto anstataŭ iri.



ANEKDOTO

Bontrovis kaj esperantigis
Jerohina Katja [Ŝala, Rusio]

Telefonvoko al frenezulejo:

– Halo, sinjoro psikiatro, mi ĵus vidis Nekonatan Flugantan Objekton.

– Kial vi ne telefonis al televido, al gazetoj?

– Ĉu mi estas idioto? Ili ja traktos min kiel frenezulon.

*

En Rusio loĝas ĉirkaŭ 16000 da diversaj specoj de animaloj. Inter ili 15000 specoj de kuloj.

*

Kion vere prononcis Isaak Njuton, kiam sur lian kapon falis pomo?

– Diable!!! Sed mi ja sidas sub pirujo!

*

Oni demandas kelneron pri lia plej granda deziro. Li iom konfuzite respondas:

– Mi volas, ke ĉiuj klientoj manĝu hejme, kaj trinkmonon sendu al mi per poŝto.

Belousov Igorj [Engels, Rusio]

Dialogo en malsanulejo

– Saluton, senpaga kuracisto!

– Saluton, senespera malsanulo!

*

– Geamikoj! Mi eklernis legi pensojn de homoj!... Bone! Mi komprenis! Mi foriras!

Kolektis kaj esperantigis N.Saldin [Jekaterinburg, Rusio]

Unu amiko al la alia:

– Mi ekmalsanis, sed al la kuracisto mi ne iros: estas tro koste.

– Karulo, mi konsilas al vi viziti kuraciston Davidson – li por ĉiu sekva vizito prenas nur duonpagon.

Tiu akceptis la konsilon kaj venis al Davidson.

– Saluton, s-ro kuracisto. Mi denove al vi...

*

Anonco en gazeto:

“Mi volas konatiĝi kun fraŭlino cele fondi bonan familion por unu nokto”.

*

Anonco. “Atenton! Hieraŭ el nia zooparko forkuris testudo. Se iu ŝajne ekvidos la testudon, ni petas turni ĝin je 180 gradoj.”

*

Anonco:

“La administracio de alkohola fabriko avertas: “Fumado, fumado kaj nur fumado de tabako estas danĝera por via sano!”

*

– Ĉu vi amas Nikolaon?

– Ne, sed el ĉiuj viroj, kiujn mi ne amis li estas la plej amata.

*

Kukovendisto sur la strato:

– Malvarmaj kukoj, malvarmaj kukoj!

– Kial vi krias, ke ili estas malvarmaj? Ja neniu aĉetos ĉe vi malvarmajn kukojn...

– Certe. En tia varmego!

*

Sadretdinova Naila
[Voronej, Rusio]

– Nu, kie estas via ĉevalo?

– Kiu ĉevalo, sinjorino?

– Kiun vi vendas.

– Mi vendas kuniklon, kien vi rigardas?

– Mi rigardas korekte. Mi rigardas al la prezo.

*

Renkontiĝas du amikoj Unu demandas:

– Mi aŭdis, ke vi organizis muzikan orkestron.

– Jes, kvarteton.

– Kaj kiomope vi tie muzikas?

– Triope.

– Kiu konkrete?

– Mi kaj mia frato.

– Ĉu vi havas fraton?

– Ne, ne havas, sed ĉu tio gravas?

*


– Sinjoroj, kiam mi vidas belan junulinon, mi pri ĉio forgesas.


– Eĉ pri tio, ke vi estas edziĝata?

– Ĉu mi estas edziĝata?

– Tutcerte.



– Do, jen, sinjoroj, ... Mi ja diris, ke mi ĉion forgesas...





Vegetara krucenigmo

Ĥohlov Aleksej [Novosibirsk, Rusio]



1. Kaĉo, kiun malŝatas infanoj 2. Dolĉa parenco de kurbo 3. Oni ĝin aldonas al kaĉo 4. Frukta supo 5. Granda amara oranĝo 6. Likvaĵo el fruktoj 7. Lakta produkto kun fruktoj kaj beroj 8. La unua somera legomo 9. Malhele blua frukto 10. Ĝin ŝatas katoj 11. Kaĉo, kiun oni manĝas kun lakto 12. Dolĉaĵo el kakao 13. Sur tio dormis princino 14. Lepora ĝojo 15. Bongusta dolĉa kuko 16. Ĝin tre ŝatas musoj 17. Kuirajo el acida lakto 18. Acid-lakta produkto 19. Oni el ĝi kuiras ruĝan supon 20. Oni ŝatas trinki ĝin kun citrono 21. Unu fojo en jaro oni ilin kolorigas 22. Dolĉaĵo en vesto 23. Dolĉaĵo el beroj kaj fruktoj 24. Ĝi falis sur la kapon de la sciencisto




Korektajn solvojn de la taskoj el "K"-2-2005 sendis al la redakcio
Loŝmanov Anton [Komsomolsk-na-Amure, Rusio]


Orienta fabelo:

17 kameloj de maljuna Dezertosinjoro + 1 kamelo de Dezertojuĝisto (li alvenis sur kamelo) = 18 kameloj.
 $18:2=9$ kameloj por plej aĝa frato (restas $18-9=9$)
 $18:3=6$ kameloj por la dua frato (restas $9-6=3$)
 $18:9=2$ kameloj por la tria frato (restas $3-2=1$ kamelo de Dezertojuĝisto). Rezulte oni dividis $9+6+2=17$ kamelojn.

Krucvortfenigmo
disfalis



Utiligu Esperanton dum viaj ferioj!



Emblemo de la renkontiĝo

Oni povas uzi kaj praktiki Esperanton multmaniere: simple komunikigi, debati interrete, verki ion poezian aŭ prozan.... Por mi — vojaĝi cele partopreni iun E-aranĝon estas unu el la plej agrablaj manieroj praktiki kaj ĝui nian lingvon. Eĉ se vi uzas Esperanton dum la tuta jaro en interreto, vere indas foje vojaĝi kaj praktiki la lingvon en pli rekta maniero! Des pli kiam estas ŝanco vojaĝi al tre interesa loko sur la Tero — al la lago Bajkal, kiu estas revo de multaj turistoj. Kaj mem la aranĝo estis unika, ĉar iĝis komuna projekto de la kelkurbaj E-grupoj de granda rusia regiono — Siberio. Ĝi enhavis sinsekvajn 3- tagajn vizitojn al siberiaj urboj Novosibirsk, Tomsk, Novokuzneck, Krasnojarsk, konatiĝon kun Irkutsk kaj unusemajnan restadon en bazejo apud Bajkal. Iniciatinto kaj ĉeforganizinto de ĉi tiu projekto estis E-aktivulino el urbo Novosibirsk **Jekaterina Arbekova**, tre aktiva kaj ideogenera homo.

Do, tiu ĉi renkontiĝo — vojaĝo daŭris neordinare longe, ekde la 8-a ĝis la 29-a de julio. En ĉiuj urboj okazis interesaj ekskursoj kaj renkontiĝoj kun la lokaj esperantistoj, kiuj ankaŭ gastigis nin. Membroj de diversaj urboj havis valoran tempon por pli bone konatiĝi kaj amikiĝi. Ĉiuj praktikaj flankoj de la aranĝo estis bone prizorgitaj kaj programeroj abundis; la turisma parto estis perfekte organizita. Denove mi povis konstati en kia belega kaj varia lando mi loĝas!

Kaj la ĉefa mirindaĵo certe estis la lago Bajkal, kiun oni ofte nomas la maro, verŝajne pro ĝia grandeco kaj vasteco. Vere ĝi estas perlo de Naturo!

Bajkal estas grandvalora natura trezorejo de pura, trinkebla akvo, ĝi enhavas 80% de la trinkebla akvo de la mondo. Laŭ la lagbordo diversflanke estas impona montaro kun arbaretoj. Volonte ni ĝuis la pitoreskan

naturon, freŝan aeron, grimpadis la montojn, spertis ĉiutagajn freŝigojn en la lago, kies akvo estis sufiĉe malvarmeta. Abundis eblecoj por longaj arbaraj promenoj kaj kolektado de fungoj. Estis perŝipaj ekskursoj laŭ la lago. Por mi estis granda plezuro stari surferdeke de la ŝipo renkonte al venteto kaj ĝui la mirindan marpejzaĝon sub altega blua ĉielo, admirinde estis vidi la horizonton, kie la maro kaj ĉielo kunfandiĝas. Aparta ĝoja sperto estis observi sunleviĝon frumatene, kiam unuaj sunradioj trafas la lagan surfacon kaj tuj ŝanĝas la akvokoloron. Kiom da variaj kaj aprezindaj aspektoj povas havi la lago!

Dum nia semajna restado en la bazejo ni esperantumis, partoprenis diversnivelajn E-kursojn, babiladis, organizis komunajn vesperajn koncertojn, kiuj estinte malfermitaj, interalie altiris atenton kaj intereson de neesperantista publiko, ripozanta en la vilaĝo. Mi eĉ ĝuis la momentojn de la ĉetabla kunestado dum la manĝoj, ĉiam en freŝa aero en la korto, kiam ni ĉiuj sidis ĉe longa komuna tablo. Kaj manĝaĵo, preparita laŭvice de ĉiuj partoprenintoj estis eksterordinare bongusta! Krome ni havis eblon regali nin per bongustega freŝfumajita fiŝo kaj eĉ kun biero! Entute — interesa, ĝoja, impresplena vojaĝo! Por rakonti pri ĉiuj miaj impresoj pri ĝi mi bezonas dek paĝojn anstataŭ unu! Por mi tio estis travivaĵo, kiun mi ne forgesos.

Laŭ la planoj de la organizantoj, oni intencas en la jaro kiam okazos UK en Jokohamo okazigi similan aranĝon en Bajkalo kaj fari ĝin internacia, tiam la vojaĝontoj al UK el aliaj landoj povus laŭ voje viziti ankaŭ ĉi tiun mirindan lokon. Sekvontsomere oni ankaŭ planas similan vojaĝon — renkontiĝon en jam alia tre bela montara regiono de Rusio — Altajo. Pri ĝi ni esperas informi vin estonte pli detale.

Rafija Kudrjaveva.

P. S. Karaj legantoj! Se vi dum viaj someraj ferioj spertis ion interesan kaj ligitan kun nia lingvo, rakontu al ni pri viaj bonaj impresoj! Ni atendos!



Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

35-jara edzo, komencanto, pri lingvoj, komputiloj, scienco, biciklado, azia kuirarto.

Bert Klijn
Klipper 119,
1721 GW Langedijk,

Nederlando

<bertmarian@hetnet.nl>

Mi estas 15-jara fraŭlo. Mi serĉas plum-amikojn ĉar mi bezonas praktiki la lingvon. Mi ŝatus korespondi papere.

Paulo de Souza
Rua Dom Nery, 324 -centro
Pouso Alegre, M.G.
CEP: 37.550-000

Brazilo

Mi estas sisteminĝeniero, nova esperantisto el Meksiko kaj mi serĉas geamikojn tutmonde. Int aliaj lingvoj, rugbeo.

s-ro *Mauricio Monroy*
Meksikurbo
Meksiko
mmonroy@netmex.com

21 jara, komencanto. Int teatro, muziko, legi, lingvoj, historio. Mi preferas paper-poŝton.

s-ro *Erik Winsor*
625 W. 27th Ave.
Kennewick,
WA 99337

Usono

Mi estas 32-jara komencanto, sciencisto pri medicino. Min interesas naturo, historio, biologio, kulturo kaj lingvoj.

Dr. Dallas Jason Grashy
4 Francis str
Bedford Park, 5042
Suda Australio

Aŭstralio

derasbv@arcom.au

Korespondi tutmonde pri diversaj temoj volas

Makarenko Valerij
p.k. 01243
170001, Tverj

Rusio

22-jara viro, studas filozofion, interesiĝas pri literaturo, kinejo, muziko, ŝako.


Jean-Baptiste Monneuse
av. du Mal Juin,
FR-92100
Boulogne-Billancourt
Paris

Francio

Mi deziras interkorespondi per paper-poŝto. Mia adreso estas:

Paulo de Souza
Rua Dom Nery, 324 -
Centro Pouso Alegre,
M.G. 37.550-000

Brasilo



58 ja. bestkuracisto volas korespondi papere kun viroj 40-65 jaraj en orienta Eŭropo, Azio aŭ Suda Ameriko. Intereso: medicino, naturhistorio, lingvoj, literaturo, legado kaj fremdaj landoj kaj popoloj.

s-ro *Sigurdur H. Petursson*
Merkjalaek,
541
Blönduós
Islando
sighp@isl.is

Kontaktoj kun esperantistoj el la tuta mondo konstante serĉas 56 jara kolektanto de telefonaj kartoj

Vladimir Pys
Trachovec 3013
OSTRAVA-Martinov
CR — 723 00

Ĉeĥio

36-jara filozofistudentino, komencanto. Min interesas *Martimus-kosmologio*, vojaĝoj, kulturoj, montpromenoj.

Renee Aagesen
Myrvejen 17,
9020 Tromstaden

Norvegio

Ĉu vi serĉas korespondamikojn?

Sendu al: **Koresponda Servo Mondskala** jenajn detalojn: nomo, adreso, retadreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, el kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. La servo estas senpaga por tiuj, kiuj loĝas en malriĉaj landoj, laŭ la tarifo B de la kotiztabelo de UEA. KSM transdonos viajn informojn al aliaj korespondemuloj, kiuj konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de EUA.



Koresponda Servo Mondskala
33 rue Louviere,
FR-55190
Vold-Vacon,
Francio

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

vij mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvena!

